Universala Esperanto-Asocio

LAND(EG)A AGADO

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2017-29 sendita el Bengaluru la 15an de oktobro..

# KONKRETAJ ATINGOJ en Sudazio

Kunsido en la 4a SudAzia Seminario, kun proks. 25 partoprenantoj, plenumis du gravajn taskojn, kiuj esperebLe fariĝos mejloŝtonaj. Unue, ili akceptis la starigon de laborgrupo por plani la revigligon de Esperanto en Barato. Tri membroj estas nomumitaj, kun la komisio kompletigi la laborgrupon per tri aŭ kvar pliaj personoj.

La tri membroj estas d-ro P.V. Ranganayakulu, d-ro Giridhar Rao kaj s-ro Kotha Naga Siva Kumar. Sur la foto Giridhar Rao videblas kun la edzino kaj filino.







Fotoj: SMG kaj s-ro Kotha Naga Silva Kumar.

Jen la konciza 18-punkta laborplano, laŭ kiu la laborgrupo laboros estas la sekva:

==================

## Laborplano por Federacio Esperanto de Barato (FEB)

La partoprenantoj de la 4a Sud-Azia Seminario (SAS) en la 15a de oktobro akceptis la sekvan laborplanon por la starigata laborgrupo de FEB.

1. Starigi provizoran laborgrupon por FEB.
2. Krei laborplanon por FEB por aprobo en la 4a SAS.
3. Pripensi manieron formale elekti novan estraron por FEB.
4. Trovi vojon aktualigi la Statuton de FEB.
5. Starigi retan grupon kaj aliajn kontaktilojn por instruistoj, kunlabore kun ILEI.
6. Kunlabori kun UEA kaj ILEI por povi disdoni atestilojn pri kurspartopreno.
7. Taksi la inform- kaj instru-helpilojn je dispono.

8. Evoluigi planojn por krei novajn helpilojn, laŭ la bezonoj.
9. Esplori eblojn por starigo kaj flego de informcentro en Barato.
10. Eldoni retan revuon – rekreu membraron – enkonduku 3-jaran membrecon.
11. Plekti sudazion pli forte en la bultenon de KAEM ‘Esperanto en Azio’.
12. Proponi trejnkursojn, eble pere de la AMO-programo.
13. Taksi la utilon de reklamkampanjo en *Facebook*, kiun UEA povos helpi realigi, kiam maturos la cirkonstancoj por trakti la informpetojn.
14. Solvi la pagadon de AM-kotizoj al UEA.
15. Altigi la nombron de individuaj membroj en UEA pere de Fondaĵo Canuto.
16. Nomumi ĉefdelegiton por Barato, kiu administru kaj kreskigu la Delegitan Reton.
17. Efikigi la laboron de FEB per starigo de du regionaj branĉoj: norda kaj suda Barato.
18. Restarigi la Kongresojn de FEB.

Notu, ke la punktoj 1 kaj 2 estas jam realigitaj; la punktoj 14 kaj 15 survojas al plenumo.

Dum la 4a SAS, kunsidis la komitato de SAS kaj decidis la lokon, jaron, sezonon kaj karakteron de la posta 5a SAS. Tio estos anoncita en la ferma ceremonio de SAS 4, okazanto post tri horoj. La laborplano kaj laborgrupo estis akceptitaj antaŭ du horoj.

PS: La decido: en Katmanduo, Nepalo en ilia aŭtuno de 2019.

Vortoj: 384

Seminaria gupfoto (SMG)

